ISSN 0299-092X
Numero 80
Marto 2004
Kvaronjara
1,25 €

# monda solidareco

Esperant - lingva eldono

Informilo de «Monda Fonduso de Solidareco Kontraù la Malsato»

## Por pli vasta engaĝiĝo de virinoj en niaj asocioj



Patrinoj æe la Mondfondusa prinutra centro de Mboko (Sud-Kivuto, Kongio).

Enhavo

Frontartikolo ........................ p.1
Konsultiĝa Asembleo, ............ p.2
Interreto kaj humaneco .......... P.3
Eŭropa Sociala Forumo........... p.4
BCEBI en Benino ................... p.5
ADYD en Senegalio ............ p.6-7
Mallonge pri projektoj............ p.7
Mondfondusa vivo................. p.8
Leterkesto............................ p.8
Kolofono, ............................ p.8

Nun kiam la balotrajto por virinoj ekzistas de malpli ol duona jarcento, la virinoj daŭre ricevas pro samaj respondecoj inter 7 kaj 27 procentojn da salajro malpli ol viroj. Kaj la starigo en tiu lando de RTT (malpliigo de labora tempo) permesis al ili-ŝi nur dediĉi la plejmulton de la disponigita tempo al hejmaj taskoj. Vere ampleksa progreso, ĉu ne ? Sed kia estus la situacio, se ne ekzistus leĝaro ? Tio signifas, ke en riĉa lando kiel Francio, malgraŭ la venkoj de la lasta jarcento, la kondiĉoj por granda engaĝiĝo de virinoj en asocia vivo ankoraŭ ne komplete kuniĝis.

**Tiam, kio okazas pri tio en la suda mondoparto ?**

Sukcesigi disvolvigajn projektojn aŭ partopreni en ili postulas fortegan motiviĝon, superplenan energion, entuziasmon kaj kreivecon, interkonsenteman kaj federeman karakteron por batali (ĉar ofte temas pri tio !) kontraŭ inerteco de kutimoj kaj komunaj ideoj. Tiom da aspektoj neatingeblaj per trudo, kiu riskus kaŭzi malajn sekvojn, naskante malhelpajn streĉojn ene de la grupo. Pli bone ol altrudi regulojn, ĉu alternativaj metodoj ne fariĝus la plej bonaj garantioj, por ke la virinoj engaĝiĝu pli grandkvante en la asocia reto ? dispartigo de hejmaj taskoj aŭ specialaj laborhoroj en kelkaj landoj, ekipado de retoj de trinkebla akvo aŭ de komunikiloj, aliro de geknaboj en laika lernejo, naskoregulado, politika stabileco ktp... en aliaj landoj. Kompleta programo por evoluo, ĉar pruviĝas, ke la inaj vivkondiĉoj strikte interligiĝas kun malriĉeco kaj kulturaj bremsoj !

Edukon de infanoj, mastrumadon, kampkulturadon kaj vendon de produktoj sur la bazaro plej ofte eltenas virinoj, kaj ĉu estas utopie pensi, ke tiu faktaro evoluos en la venontaj jardekoj eĉ jarcentoj ?

Tamen la laborejo, la bazaro, la kuracejo, la lernejo estas ankaŭ renkontejo kaj interŝanĝejo, kiuj ebligas al virinoj pli bone koni ilian medion (socian, ekonomian, agrikulturan, politikan en la strikta signifo.), t.e. vera "humo" en kiu povas ĝermi lokaj iniciatoj. Ĉu pro tio, malgraŭ ĉio, la disvolvigo estas plej ofte virina faro ?

Eble sufiĉus rememorigi (aŭ sciigi !) al virinoj tiel kiel al viroj, ke krom la fiziologia malsameco pri muskolaro, ili-ŝi estas kompareble kapablaj kiel ili-li. Kaj, ke viroj nenion devos timi aŭ perdi, kiam ili konfesos la intelektan egalecon, kiu nur pliriĉigos ilian interrilatadon kun sensa komplementeco, por la komunuma feliĉo !

*Emmanuelle Gen*

*Elfrancigis MFCR 2004-03-17*

# Konsultiĝa Asembleo

En la lasta numero, ni anoncis la du æefajn rezultatojn de la lasta Plena Kunveno de la Kongreso de la Popoloj (Oktobro 2003)[1] : la reformo de la voædona leøo, kaj la kreado de Konsultiøa Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj.

Ni faris kiel eble plej ampleksan situacian konstaton de la demokrata tutmondismo, ekde la kreado de Internacia Registrolibro de la Mondcivitanoj en 1949, øis la nomitaj alimondistaj iniciatoj de æi lastaj jaroj. Tio nun fariøis evidenteco kaj neceseco por multaj organizoj kaj pensfluoj : la vivo sur la tero, la biosfera pluvivo estas intime ligitaj al la kapablo de la loøantaroj regi siajn vivojn kaj sian komunan estontecon. La Mondcivitanoj estas tiuj, kiuj metas la intereson de la homaro super la naciaj interesoj. La Mondcivitanoj sindeklarintaj, "enregistritaj" kiel ni diras, ne estas nuraj por voli pro elekto, ke tiu komuna estonteco de la homaro estu demokrata. Multaj dekoj da organizoj æu esprime æu implice konsentas pri tia elekto. Æar ili konscias, ke tiu tutmonda demokratio povos trudiøi nur per unuiøo de iliaj fortoj, dum la lastaj jardekoj ili ariøis en diversaj kuniøoj : unu el ili decidis lanæi gradan balotelekton de Kongreso de la Popoloj. La enregistritaj Mondcivitanoj, sed ankaý dek kvin organizoj kaj dudek tutmondiøintaj urboj partoprenis en øi.

Al la Kongreso de la Popoloj, reprezenta organo konsistanta el kvardek elektitoj disaj tra la mondo, mankas la monrimedoj, kaj tial malmultis la agadoj. Tiam ni spektis kreskantan disþiron inter tiu ne-agemo kaj la forta postulo, kiu venas de æie kaj interalie de la grandaj socialaj kuniøoj je la seræo de klara kaj fidinda mesaøo. La solvo estis inspirita de la Subtena Komitato dum la preparo de la Plena Kunveno de la Kongreso de la Popoloj : Necesas kunvenigi la organizojn kaj æiujn, kiuj opinias ebla alian mondon, en multajn asembleojn, por ke æiuj renkontiøu, interþanøu siajn spertojn kaj siajn dezirojn, kaj ke ili submetu ilin al la reprezentaj organoj, por ke je la nivelo, en kiu situas la problemo, la elektitoj diru la rajton : rajto de homo, rajto de homaro, rajto de la venontaj generacioj, kaj sendube ankaý la devojn, kiuj rezultas el tiuj rajtoj.

Unuvoæe la partoprenantoj aprobis la kreadon de la Konsultiøa Asembleo æe la Kongreso de la Popoloj ; kaj kalendaro estis tuj difinita.

- Ä La 7an de februaro laborgrupo kunvenis en Parizo por pripensi la funkciadon de tiu Konsultiøa Asembleo. Rajtos partopreni en øi æiuj organizaĵoj, kiuj deziras tion : tiuj jam tutmondiøintaj, kaj tiuj kiuj konsentos kun æarto nun redaktata. Do Monda Fonduso, la asocioj, kiuj subskribis la æarton por Tutmonda Institucio de Solidareco, kaj la tutmondiøintaj urboj plenrajte partoprenos en øi. La pordo estas malfermita ankaý al la simplaj civitanoj tra forumoj en kiuj ili povos partopreni.
- Ä La 17an de aprilo 2004, ankoraý en Parizo, okazos la oficiala lanæa kunveno kun plej larøa invitado[2]. Fina redaktado de la æarto kaj de interna regularo, kaj preparado de la unua Asembleo (2).
- Ä La 2an kaj 3an de oktobro 2004 en Mulhuzo, unua regiona Asembleo. Inter pluraj eblaj temoj : la medio, æirkaý IKTAM/CILAME[32] kaj la asocio "*Agado por Medio*". Fakte nun evoluas procezo por la kreado de monda organizaĵo pri medio. *Internacia konferenco okazos baldaý en Parizo por enkonduko de tiu propono en la tagordon de la Øenerala Asembleo de Unuiøinta Naciaro, en Novjorko.* En tiu perspektivo la Mulhuza kolokvo okazos du semajnojn antaý la Øenerala Asembleo de UN. Tio evidentiøas kiel tre taýga dato laý strategia vidpunkto. *Kaj æiuj membroj de Monda Fonduso scias, ke la kapablo de la tero nutri siajn loøantojn en la venontaj jaroj estas ligita al nia kapablo nun antaýgardi la naturon, la biosferon.* Ni plu parolos pri tio en venonta bulteno.
- Ä La dua regiona asembleo de la Konsultiøa Asembleo povus okazi en Afriko, ktp laý la civitanaj iniciatoj.

*Daniel Durand*

## Pascale, Fleur, Emmanuelle...

La animado de Monda Fonduso postulas tempon kaj disponeblecon de øiaj volontuloj" (cf Monda Solidareco n°79). Ankaý tion spertis Pascale De La Cruz. Sindevontigite en aktivecojn de sia urbeto : biblioteko, historiaj posedaĵoj, turismo kaj multaj animadoj por la infanoj, þi decidis eksiøi de nia Administra Konsilantaro por pli serene kaj pli komplete sin dediæi al la nove elektitaj aktivecoj.

Ni dankas þin pro la akompano kaj deziras al þi plenan sukceson en þia devontiøo.

Kontraýe Fleur Enriquez-Sarano, kaj Emmanuelle Gen, ambaý æeestintaj la lastan kunsidon de la Administra Konsilantaro, konfirmis sian projekton pli komplete engaøiøi tuj kiam ilia situacio ebligos tion.

*Danièle Charier, Øenerala Sekretariino*

1 : la Kunvena Protokolo estas havebla je la adreso de la bulteno (3 Eýroj) Øi estas ankoraý libere alirebla en Interreto : http://www.recim.org/kdp/2003-fr.htm

2. Por pliaj informoj pri tiu kunveno, skribu al Daniel Durand. Adreso de la bulteno.

3. CILAME : Internacia Komitato por Tutmonda Aýtoritato pri Medio

# Interreto kaj humana agado

Interreto montriøas kiel miriga ilo por favori la humanan agadon.
Kio pri Monda Fonduso ?

Unue necesas kompreni kio estas Interreto

## Interreto : la tekniko

Do ni komencos per teknika parto, kiu eble ŝajnos al vi iom teda, sed kiu necesas por bone kompreni la sekvon.

La vorto "internet" devenas de la angla "inter-networks" inter-retoj. Tiu vorto indikas, ke rilato ekzistas inter diversaj informadikaj (komputilaj) retoj, kaj tiuj komputiloj povas tiamaniere komuniki kaj interŝanĝi informojn inter si.

Do Interreto troviĝas inter tiuj komputiloj, kiuj komunikas inter si. Nu ĉar ekzistas ne nur du aŭ tri komputiloj interrilatigitaj (konektitaj), sed milionoj disaj tra la tuta planedo, ni povas diri, ke Interreto ne situas en unika loko.

Ĝuste la ideo pri malcentralizo de la informfonto, por protekti la tiklajn informojn, fundamentis tiun sistemon kaj ebligis eviti eventualajn riskojn okaze de milito, kataklismo, brulego, ktp.

Tiu disigita informsistemo povis naskiĝi ĉar ĝuste inter la karakterizaĵoj de la cifereca informado, oni disponas pri la jenaj avantaĝoj : la transportata informado havas nulan mason (neniom pezas), kaj nulan fizikan dimension (neniom mezuras), kio estas tre praktika por la transporto. Des pli ke ĝi iras tre rapide, je la rapideco de la lumo, tio estas sepfoje la rondiron de la tero dum unu sekundo.

Por resumi tiun teknikan parton, ni povas diri, ke Interreto ebligas lumrapidan informan interŝanĝon per maŝaro da interkonektitaj komputiloj kiel giganta aranea reto (anglalingve = web) kaj tio tra la planedo. Praktike, se mi sendas mesaĝon de ĉi tie, de la mondfondusa sidejo en Gemeaux, preskaŭ samtempe ĝi povas esti ricevita en Antananarivo (Malagasio) same kiel en Tokio (Japanio) aŭ en Vagaduguo (Burkinio). Krome ni aldonu, ke Interreto ignoras la landlimojn.

## Al kio utilas Interreto ?

Ĉar ĝi kapablas fulmlume transporti grandegan kvanton da informoj, ĝi kompreneble povas transporti ciferojn kaj literojn, sed ankaŭ tion laŭnome : plurmediata enhavo, t.e. sono, muziko, bildoj, videofilmoj...

Ĉar ni vidis, ke ĝia agadradiuso ampleksas la planedon, sufiĉas, ke estu kreitaj serĉiloj por ke la interreta utiliganto povu ekserĉi kaj trovi la deziritajn informaĵon aŭ elementon. En Interreto oni do tiel facile trovas informaĵojn pri la pluvkvanto en Ĉilio, kiel ekhavi recepton de ignama manĝaĵo, aŭ konsulti studaĵon pri la muzika verkaro de Mozarto, aŭ ... aŭ ...

**Ni do povas elmeti, ke unu el la ĉefaj karakterizaĵoj de Interreto estas, ke ĝi ebligas la disvolviĝon de socio kun aliro al la informaj kaj sciaj riĉofontoj akumulitaj de ĉiuj por ĉiuj.**

Ĝi estas ebla fonto por edukado kaj instruado, kondiĉe, ke ĝi estu alirebla de la plej multaj terloĝantoj.

Oni nepre konsentu, ke Interreto estas unu el la plej potencaj vehikloj de la procezo de merkata globaliĝo, kiu nun pligravigas la ekonomiajn kaj socialajn malegalaĵojn inter la popoloj. Sed Interreto estas ankaŭ utiligebla kiel sociala mobilizilo, kiel ilo instiga kaj reaga por la organizaĵoj, kiuj laboras por egaleco, libereco kaj justeco.

Ne estas antaŭpensite, en tiu artikolo, fari kompletan etaton de la bonaĵoj kaj malbonaĵoj, kiujn povas alporti ilo kiel Interreto. Ni priskribos nur kelkajn aspektojn de tiu fenomeno. Tamen ni memoru, ke kio estas utiligebla por boneco, tio estas ankaŭ utligebla por malboneco, same kiel iu ajn ilo (ekzemple tranĉa klingo en la manoj de kirurgo aŭ de krimulo.)

## Interreto kaj solidareco

Povi kontakti iun ajn organizaĵon aŭ iun ajn homon, iam ajn kaj ie ajn en la mondo, malfermas pordon al la kapablo aliri al la tuta agantaro de la internacia solidareco. Tio ebligas realigi agadojn je niveloj ĝis tiam nealireblaj de la ordinaraj NŜO. Prie Internacia Amnestio ne eraris kaj estis inter la unuaj por ekspluati tiun rimedofonton.

Ĉu ekzistas pli bona ilo por rapide kaj malmultkoste mobilizi kaj informi ĉiun komunumon, lokan aŭ transliman ?

Ĉu ekzistas pli bona mediato por importi aŭ eksporti ideojn pri reala demokratio trans la politikaj limoj ?

Interreto faciligas la laboron kaj la kunlaboradon inter humanagantoj. Interreto estas ankaŭ ponteto inter organizaĵoj, kiel Monda Fonduso, kaj homoj. Ĝi estas samtempe montrofenestro, biblioteko kaj babilejo.

Tamen ni bone konsciu, ke la ĝenerala aliro al Interreto estas for de la realeco, ĉefe por la malpli riĉaj.

Se ni prenas la ekzemplon de Afriko en 2002, inter suma enloĝantaro taksita je 770 milionoj da homoj, nur 5,5 milionoj utiligis Interreton, kio egalas unu interretulon por ĉirkaŭ 140 homoj. Sed se ni eligos Sudafrikon kun ties tri milionoj da interretuloj, la nombro falas ĝis 1 por 300 (fonto AfricaOnline, aprilo 2002). (Notinde : la monda averaĝo estas 1 por 15).

*Daýrigote*

*John De La Cruz*
*Delegito de la regiono Eýropo.*



# Dua Eŭropa Sociala Forumo

Kiel dirite de Daniel Durand en sia frontartikolo de la numero 79, kaj de Globidar, kelkaj inter ni æeestis la Eýropan Socialan Forumon de novembro 2003. Malfacilas detale raporti tre fortajn kaj diversajn impresojn, des pli ke ni devis konstante de¼ori æe la stando, kiun ni dividis kun du aliaj asocioj membroj de CEIP/CRID. Vi sciu, ke nia partopreno utilis por kolekti novajn kaj korajn kontaktojn, kies interesajn sekvojn ni esperas post tempo. Ni reprenas tie æi la raporton de CEIP/CRID, disdonitan en øia interreta bulteno CRID'info n-ro 23 : la amplekso kaj la spirito enestas.

Kvankam la dua Eýropa Sociala Forumo (ESF) de Paris, Saint-Denis, Bobigny, Ivry (12 øis 15a de novembro 2003) suferis pro geografia diseco sur la kvar urboj, tamen øi fakte sukcesis. 51.000 homoj partoprenis en 55 plenaj kunvenoj, 271 seminarioj kaj 280 diskutgrupoj. Æeestis reprezentantoj de organiza¼oj el 60 landoj : 4.000 Italoj, 4.000 Britoj, 3.000 Hispanoj (el kiuj 2.000 Katalunoj), 500 Germanoj, 1.000 Orienteýropanoj.

Sed trans la nombra sukceso, la atingon de ESF 2003 oni taksu laý la progreso pri la tri celoj, kiujn fiksis al si la organizintoj : la pliprofondigo de la penso pri la eýropaj aferoj, la geografia pliampleksiøo kaj la socia plilarøigo.

**F** Koncerne la eýropajn aferojn, dum la debato estis balbutanta dum la ESF de Florenco en 2002, tiu dua forumo ebligis pli antaýen iri. Eýropa konstitucio, sociala Eýropo, publikaj servoj, migradoj en Eýropo kaj al Eýropo, ktp : Eýropo ja estis en la kerno de la debatoj.

**F** Koncerne la geografian pliampleksiøon, dezirite de la organizantoj, efektiviøis æeesto de multnombraj reprezentantoj de la civilsociaj organiza¼oj de la mezaj kaj orientaj Eýropaj landoj : ja temis pri Eýropa Sociala Forumo en la kontinenta senco de la esprimo. Tiel la nombro da intervenantoj devenaj de orienteýropaj landoj en la plenaj kunvenoj estis kvarobla ol tiu de Florenco.

**F** Koncerne la socian plilarøigon, la loøantaroj kaj la sociaj agantoj plej severe suferigitaj de la novliberaj politikoj kaj la sekurecaj logikoj (la "sen-uloj", la loøantoj devenaj de la migradoj, la loøantoj de la malriæaj kvartaloj) estis pli æeestaj, kiel partoprenantoj sed ankaý kiel intervenantoj. Pri tiu celo, la progreson rilate al Florenco mem atestis la koncernataj agantoj.

Al tiuj pozitivaj elementoj, oni aldonu :

**F** - la plimultiøon de la agantoj partoprenintaj en la preparado de ESF ;

**F** - la konsistigon de platformo pri medio por la konstruo de ESF ;

**F** - la konsistigon de platformo pri solidara kaj sociala ekonomio ;

**F** - la æeeston de multnombraj junuloj ;

**F** - unuan debaton inter la Forumo de la lokaj aýtoritatuloj kaj la reprezentantoj de organiza¼oj partoprenintaj en ESF.

**F** - la kvaliton de mil interpretantoj de la reto Babels (internacia reto da volontaj interpretantoj), ebliganta samtempan tradukadon al dudeko da lingvoj, kaj do veran eýropskalan debaton.

## Arkivejo de ESF.

CEIP/CRID iniciatis konsistigi laborgrupon "protokoladan" por ke povu ekzisti memoro pri la debatoj okazintaj dum la Eýropa Sociala Forumo 2003. La protokola laborado estas grava por :

**Ä** - konstrui la memoron de la debatoj per la kolektado de la skribitaj kaj parolaj dokumentoj ;

**Ä** - afiþi kaj plej larøe diskonigi la debatojn, interalie per Interreto, al æiuj, kiuj ne povis partopreni en la forumo ;

**Ä** - kuraøigi interþanøon kaj idean debaton invitante la partoprenantojn strukturi siajn kontribua¼ojn per intenca teksto kaj fina sintezo ;

**Ä** - kontribui en unueca analizo de la diverseco de la agantoj, iniciatoj, konsideroj kaj proponoj.

La protokolado estas do unu el la impetaj rimedoj, kiuj en la procezo de la socialaj forumoj, deziras favorigi ekaperon de alternativaj, pluralaj proponoj, respegulantaj la diversecon de la partoprenantoj, same kiel ties agadoj. Øi ebligas al æiu senti sin aganto kaj partoprenanto de granda movado da ideoj kaj iniciatoj.

Tiu kolekto da dokumentoj estas nun disponebla sur la paøo "mémoire" de la foruma interretejo : http://www.fse-esf.org (baldaý alirebla per ligilo el la ttt-ejo de Monda Fonduso, http://www.globidar.org.)

# Kio pri la projektoj ?

## En Benino, kun BCEBI en Bohicon

Dosiero n° 01.02.BJ

La Benina Centro por la Evoluigo de la Bazaj Iniciatoj BCEBI/CBDIBA estas NÞO fondita en Benino en 1990, kiu taskis al si la akompanadon de kamparanaraj organiza⁞oj por ilia vera progreso.

De tiam øi æiam provis mobilizi gravajn rimedojn por la akompanado de komunumoj de diversaj areoj de la Benina respubliko. Sed fronte al la daýra malpliiøo de la helpo por evoluo, la NÞO integris en siajn agadojn, ekde 1995, la antaýenpuþon de profitcelaj unuoj. Tiu iniciato kongruas kun sia memfinanca politiko. Tiamaniere estis kreitaj :

**F** - Centro de inicado al kleriøo kaj al memevoluo

**F** - agrikultura bien-lernejo : produktunuo, kiu laboras precipe pri agrikulturo certigante la klerigadon de la junuloj al la kamparaj profesioj.

Kreita en 1995, tiu lasta unuo havas la mision apogi BCEBI en øia laborado de integrita evoluado tra la jenaj celoj :

**F** - krei kadron por akiri praktikajn konojn pri kultivado kaj bredado.

**F** - kontribui al la memfinancado de BCEBI per ekonomiaj aktivecoj.

La aktivecoj, kiujn evoluigas tiu produktunuo estas grupeblaj laý la jenaj tri fakoj :

**F** - fako de besta produktado : tie lokiøas la bredado de diversaj bestaj specoj (kortbirdoj, kunikloj, agutioj, malgrandaj kaj grandaj remaæuloj) ;

**F** - fako de vegetala produktado : tiu fako integrigas la jarajn kultivojn kaj la fruktodonajn kaj arbarajn speciojn ;

**F** - fako de klerigado : øi esprimiøas per la instruado de la teoriaj kaj praktikaj konoj pri agrokulturo, legomkultivado kaj bredado profite al la junaj agrikulturistoj.

Kompreneble, tiuj diversaj aktivecoj konsistigas antaý æio respondojn al la bezonoj sentataj de la lokaj loøantaroj. Tiel, ekzemple, la aktivecoj pri besta produktado estas elektitaj por plenigi mankon pri proteinaj produktoj sine de la loøantaro. Do por certigi substancan produkton de viandaj produktoj, la bien-lernejo prilaboris kun partnereco de Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato projekton de besta produktado por kiu øi ricevis financadon el tiu lasta.

### Aktiveco de la projekto

La unua financparto de la projekto estis pagita de Monda Fonduso en septembro 2003 kaj la dua parto estis liberigita unu monaton poste. De tiam la produktaj aktivecoj elvolvitaj en kadro de tiu projekto koncernas :

**F** - la bredadon de rasaj junaj kokoj ;

**F** - la bredadon de kuniklidoj.

Tiuj du eksperimentoj nun okazantaj en la bienlernejo jam atingas kelkajn sukcesojn.

### Bredado de rasaj junaj kokoj.

De post la disponigo far Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato al la bienlernejo de la petita financado, ni jam ekbredis du bandojn da kokidoj. Unua bando kun 500 komence de septembro 2003 ; la dua bando (600 idetoj) ekiøis pli malfrue en novembro 2003. Tiu tempo inter ambaý bandoj estas eksplikebla pro la konstruado de la dua kokejo, kiu daýris kelkajn semajnojn. La ekspluato (vendado) de la unuabandaj kokidoj okazis dum la finjaraj festoj, periodo kun kutime pli altaj viandaj postuloj.

La vendado de la duabandaj kokidoj okazos ekde la dua duono de februaro 2004. Æiu bando estas bredata dum 3-4 monatoj.

| Bando | Nombro da Aæetitaj kokidetoj | Konstatita mortokvanto | | Nombro da venditaj kokidoj | Notoj |
|---|---|---|---|---|---|
| | | Procento | Nombro | | |
| 1 ª | 500 | 5,0 % | 24 | 476 | La rezultatoj de la vendado de la unuabandaj kokidoj igas antaývidi favoran sekvon de tiu aktiveco. |
| 2 ª | 600 | 3,3 % | 20 | 580 | |






### Bredado de kunikloj

Tiu eksperimento komenciøis ankaý en septembro 2003

Kun dirata tre naskema specio la bestaro rapide kreskis sekve de la unua ondo de konstatitaj naskoj. Tiun fakton bone ilustras la jenaj statistikoj :

- komenca bestaro (generantoj) : tiu bredado komenciøis kun 36 generantoj el kiuj 30 femaloj kaj 6 maskloj.

- naskoj/idaroj : nun oni nombras 94 vivantajn kuniklidetojn.

- kvanto de la bestaro post tri bredmonatoj : oni nombras sume 129 bestojn el kiuj 35 generantoj kaj 94 kuniklidetoj.

- procento de la bestara kreskado : 268 %.

Tiu ïus komencita aktiveco, koncernanta specion pli kaj pli bredatan en la areo, povos post tempo evidentiøi kiel unu el la plej profitigaj en la bieno. En tiu perspektivo la ideo baldaý plinombrigi la generantan bestaron, kuras en la penso de la responsuloj pri la biena evoluigo.

Por certigi la efektivigon de la projekto, Monda Fonduso de Solidareco Kontraý la Malsato instalis pluzorgan sistemon. Tial jam en oktobro 2003 la plenuma Direktoro de la NÞO ECIDAM/ CERIDAA (*) efektivigis mision en la bieno. Tiu vizito kun interþanøoj kaj konsiloj ebligis al la Mondfondusa reprezentanto esplori pri la kondiæoj de la projekta efektivigo kaj pri la unuaj atingoj okazintaj en tiu kadro.

La projekto de besta produktado submetita al la financado de Monda Fonduso nun troviøas plenumata. La du bestaj specoj bredataj en tiu kadro bone evoluas. Tiel do la unuaj atingitaj rezultatoj post kvar bredmonatoj aýguras bonan daýrigon de tiu aktiveco kun senteblaj rezultatoj. Tial konklude ni tre sincere dankas Mondan Fonduson por øia apogo.

*Patrice Lovesse*
*Plenuma Direktoro de BCEBI*

NDLR : la animantoj de BCEBI aliĝas de pluraj jaroj al Monda Fonduso. Do ja per la normala mutualisma funkciado BCEBI provis profiti de tiu financado (3.000.000 FCA F, t.e. 4.573 Eŭroj, el kiuj duono kiel repagebla pruntodono en unu jaro en oktobro 2005). Al la dankado de S-ro Lovesse, ni respondas per tiu de ĉiuj Globidaranoj pro la fideleco de BCEBI al siaj devontigoj.

ECIDAM/CERIDAA (Benino), Ne-Þtata Organizaïo kun kiu Monda Fonduso subskribis kunlaboran konvencion.

# En Senegalio, kun ADYD de Dahra Djolof

(dosiero n°02.09.SN)

ADYD estas NŜO Asocio por la Disvolviĝo de Yang-Yang kaj Dodjie, kiu oficiale laboras ekde 1995 en la departemento Linguere, en la regiono de Luga, norde de Senegalio, en volofa(*) areo ("Djolof"). Yang Yang situas je 31 km norde de Dahra-Djolof, kie sidas ADYD, kaj Dodjie situas je 23 km nordoriente de Linguere, de la departementa ĉefurbo, kiu distancas je 43 km oriente de Dahra Djolof.

## La fizika medio.

Sine de arbarpaŝta areo, tiu departemento ampleksas 19.129 km² kun 157.067 enloĝantoj, el kiuj 60 % estas virinoj, t.e. denseco de 8,5 h/km².

Post pasinteco tre pluvmanka, tiu areo spertas de kvar jaroj normalan revenon de pluvoj, kiuj ebligis la rekomencon de la agrikulturaj aktivecoj. La plej granda zorgo de la duonnomadaj loĝantaroj, plej multaj en tiu areo, estas ĉu sufiĉe pluvos por kreskigi herbon, ĉar la abundeco de la paŝtejoj konsistigas profitigan oportunon. Tie oni rimarkas enmigradon de agrikulturaj loĝantaroj, kiu montras denovan dinamismon de la volofaj vilaĝoj.

## La kamparanaj aktivecoj

La du grandaj sezonoj (seka kaj pluva) ritmas la du grandajn tipojn de kamparana aktiveco : la migra bredado (je la serĉo de akvo) la tutan jaron kaj la kombinita agrokulturo dum la pluvsezono. Tiu lasta aktiveco malpliiĝas pro la kreskanta nereguleco de la pluvoj. Por la virinoj, necesas aldoni al la paŝtistaj aktivecoj la hejmajn laborojn, kiuj ampleksas ĝis la konstruado de la loĝejoj kaj ties prizorgado.

En tiu socio, la divido de la laboro estas aparte malfavora al la virinoj, al kiuj mankas tempo por la evoluigaj aktivecoj, al kiuj oni trudas fruajn edziniĝojn, kiuj malmulte vizitas lernejon aŭ ne estas alfabetigitaj, kaj kies gajnoj estas tre malaltaj.

La komplekseco de la paŝtmigraj praktikoj, kiuj povas esti foraj kaj daŭraj ("***políndají***") aŭ proksimaj kaj mallongtempaj ("***kawle***", "***pettojí***"), aŭ dependaj de putoj ("***gure dumale***") estigas tiun de la familiaj migradoj kaj plifortigas ĉiujn socialajn malavantaĝojn ligitajn al nefikseco. Tamen ĉar nun la putoj konverĝigas homojn kaj bestarojn dum la seka periodo, ili grave rolas en la fiksigo de la nomadoj. Tial la nuna tendenco konsistas en la ekiro de nur parto de familianoj kun bestaro dum la alia parto ne moviĝas kaj gardas kun si la laktodonajn bovinojn. La proksimeco de la putoj kaj la tie okazantaj semajnaj bazaroj ebligas al la loĝantaro interŝanĝi.

## La problemoj de la loĝantaroj

Al la malfacilaĵoj ligitaj al la duonnomada vivmaniero aldoniĝas la vico da problemoj komunaj al la Sahelaj, kaj pli ĝenerale, misevoluintaj regionoj :

- pri sano : malario, infektaj malsanoj, intestaj parazitozoj afekcias la vivdaŭron, la energion kaj ĉefe la pluvivon kaj la kreskon de la infanoj. La higiena manko, la malbona sanitara kvalito de la trinkakvo, la misapudeco de la bestoj, la medicina misekipado, la nedispono de kuraciloj, la nesufiĉa edukado pligravigas la efikojn de la klimataj kaj sociaj rigoroj.

- pri nutra sufiĉeco : la konstanta manko ligita al la klimato kaj al la media difektiĝo instigas la bredistojn regule vendi siajn bestojn por sin nutri kaj la agrikulturistojn al urba almigrado.

- pri bredado, kiu okupas pli ol 90 % de la terspaco : la perdoj pro epizootioj kaj parazitozoj estas gravaj. Tion kaŭzas la nescio de la bredistoj pri prevento kaj higieno aldone kun la difektiĝo de la paŝtejoj. La intersezona mankperiodo estas aparte malfacila, ĉar la kompletigaj nutraĵoj tro kostas por la financaj rimedoj de la bredistoj.

### ADYD

En tiu cirkonstanco, ADYD provas antaŭenpuŝi ĉiujn elvolviĝajn aspektojn en la kamparaj partoj de sia agada areo. Ĝi havas kiel avantaĝojn bonan reprezentecon de la areo kaj bonan komprenon de la lokaj agroarbarpaŝtismaj problemoj, interalie tiuj de la bredistoj. Ĝiaj malforta؛oj kuŝas en logistika manko (ĉieniranta veturilo) por certigi bonan animadon de la regiono, kaj ĝis la alveno de Monda Fonduso ĝi ne havis partnerojn por helpi ĝin plenumi la elvolviĝajn projektojn, kies necesecon ĝi sentas.

ADYD estas aparte tre atentema pri la situacio de la virinoj kaj pri la rolo, kiun ili havas aŭ povus havi favore al elvolviĝo.

### La projekto

Kaj ĝuste la projekto, por kiu ADYD petis helpon de Monda Fonduso koncernas la virinojn, paŝtismon kaj la mankperiodon.

Inter la virinoj, la plej vundeblaj, la plej suferantaj, la damnitaj : temas pri la vidvaj, la repudiitaj inoj aŭ la fraŭlinaj patrinoj, kiujn la komunumo forlasas al ilia sorto. Pezo de la kulturo kaj de senkompataj kaj rigidaj tradicioj ! Sen kampo, disponante nur unu aŭ du bovinojn, iliaj vivtenaj rimedoj estas malgravaj kaj ilia situacio fariĝas drama dum mankperiodo, dum seka sezono. La problemo kuŝas en la produktado de sufiĉe granda kvanto de lakto, certe, sed ne sufiĉas produkti : necesas ankaŭ konservi kaj vendi ! du obstakloj por tio : la klimato, kiu praktike malebligas ĉiun ajn konservadon, kaj la laktokomercistoj, kiuj piratumas la kamparanaron altrudante siajn prezojn.

Fronte al tio, ADYD kreis en Dahara Djolof kooperativon por kolektado, konservado, transformado kaj komercigo de lakto. La virinoj povas liveri al ĝi sian produkton por taŭga prezo. Plue la virinoj devas sufiĉe produkti kaj konservi la lakton almenaŭ dum la transporta tempo. La problemo pri la konservado povas solviĝi per aldono al la lakto de kontraŭfermenta enzimo, la laktoperoksidazo. La problemo pri la kvanto necesigas, ke la virinoj disponu dum la seka sezono sufiĉe kvantan kaj bonkvalitan kompletigan nutra؛on por siaj bovinoj.

En januaro 2004, post du jaroj de traktado, ADYD, kies membroj mondfondusaniĝis de pluraj jaroj, ricevis operacian kapitalon por la aĉeto de bovnutra stoko ebliganta al trideko da afliktitaj virinoj, ke iliaj bovinoj po du plu produktu lakton en seka sezono kaj ili vendu ĝin parte ĉirkaŭ si kaj parte al la kooperativo ADYD por taŭga prezo. Temas pri komenca kapitalo : el la vendosumo la bovinistinoj ŝparos la necesan sumon por aĉeti la sekvontajn proviza؛ojn, kaj tiel plu.

Entute temas helpi ADYD iniciati pozitivan produktosistemon per kiu la agantinoj povos definitive eliri el sia ekstrema necerteco, kontraŭ plej malalta kosto. La partopreno de Monda Fonduso sumos je 3.000.000 CFA F (4.573 Eŭroj), el kiuj duono repagota per tri jarpagoj ekde junio 2005. Poste al ADYD la necesega tasko klerigi la profitantojn daŭrigi laŭ la jaroj tiujn novajn vivtenajn rimedojn.

*Por ree¶i la frontartikolon de Emmanuelle Gen en tiu numero, ni ne dubas, ke per tiu rekono, nova por ili, kaj per sia propra kunlaborado en la kadro de ADYD, tiuj eksigitaj inoj kapablos retrovi memfidon kaj, kial ne, mem ekpaþadi al kolektiva progreso.*

*Christian Trianneau*

Volofoj = unu el la popoloj de Senegalio kaj Gambio, kun komuna "volofa" lingvo.

## Mallonge el Benino

Nia partnera NÞO en Come ECIDAM raportis al ni pro la elvolviøo de kelkaj projektoj en tiu lando :

Kooperativo Agblegnon en Klouekanme (dosiero n-ro 98.03.BJ) : la kooperativo vidis sian membraron malpliiøi pro multaj elmigradoj al Niøerio aý al la urbo kaj pro multaj forpasoj. Nun øi sin reorganizas æirkaý la 7 agemaj restantaj personoj. Novaj aliøoj estas atendataj, kaj øenerala asembleo okazis en februaro por relanæi la agadojn. La palmidoj de la arbidejo financita de Monda Fonduso estis plejparte venditaj kaj la cetero estis plantita sur 14-hektara parcelo por la produktado de oleo, je granda kontentigo de la kooperativanoj. S-ro Satchi-Gbondjé prezidanto de Agblegnon anoncas la repagon de la duono de la pruntodono tuj post sia Øenerala Asembleo, kaj la alia duono je la fino de 2004.

ECIDAM (dosiero n-ro 98.02.BJ) : la memmastrumata muellaborejo de Sahoué-Gahoué bone funkcias. Tamen la varmeco de pli longa ol kutime seka sezono nocis la rikolton de manioko, kio malpliigis la raspan aktivecon. Sed la muelado de maizo glatas. La dua parta repago estis anoncita de René Tchibenou por februaro. (La unua repago okazis en aprilo 2003).

LA KVIN-FINGROJ (dosiero n-ro 01.01.BJ) La virinoj, gvidataj de siaj du Odette (Anato la prezidantino kaj Hegbe la projektestrino), jam trifoje fabrikis tapiokon, sed la magazeno ne estas finita pro la viraæa sinteno de la masonisto, kiu seræas subþteli la virinojn ! Tamen tio progresas. La puto estas fosita. Kaj jen ekzemplodona fakto : la virinoj jam þparis la sumon de sia unua jarpago por øiri øin en taýga momento. Øi estas ankoraý e¶o al la frontartikolo d'Emmanuelle Gen... Imitinde, Sinjoroj !

*AC*



## Mallonge el Togolando

Agropaþtista Grupo ESTONTECO en Lome (dosiero n-ro 00.03.TG) : la 27an de novembro 2003, *3A** transsendis al ni la plenuman raporton de la unua parto de la legomkultiva projekto de tiu gea grupo animata de S-ino Constance Akpaki. Mastruma komitato, konsistanta el tri membroj, enoficiøis, kaj estis aæetitaj la irigaciilaro, kaj la plejparto el la kulturmaterialo, agrikulturaj necesa؛oj kaj semoj. Fakte la legomkultiva aktiveco komenciøis kiel provoj pri metodoj antaý la financado de la dua parto. Male de la benina regiono de Mono (v. pri la projekto CERIDAA) tiu de Ziou suferis pro troaj pluvoj, kiuj inundis la maræajn parcelojn. Tio malfruigis la instaladon de la kanaletoj. Apud la legomkultivado, ESTONTECO iniciatis dum la sama agrikultura kampanjo la kultivadon de maizo, manioko, arakido kaj ananasoj (biorespektaj), kaj la bredadon de kokidoj, kunikloj, kaproj, agutioj. La aløiro de la dua financparto por tiu legomkultiva projekto efektiviøis komence de januaro, tiamaniere plifortiganta la dinamismon de tiu aparte vigla grupo.

*AC*

*3A*/APGA : Asocio por Antaýenpuþo de la Agrokulturistaroj.

# Okcidentafrika Asembleo



En aýgusto 2004, se æio glatos, okazos en Vagaduguo la unua okcidentafrika asembleo de Monda Fonduso. Dua grado en la konstruado de la federacia strukturo de Monda Fonduso, øi celas la balotelekton de du Afrikaj delegitoj, kiuj dum ses jaroj kunsidos en la Administra Konsilantaro de Monda Fonduso, same kiel la jam elektita Eýropa delegito John De La Cruz. Veturos al Vagaduguo la reprezentantoj elektitaj de la grupoj kaj pluzorgaj komitatoj el Benino, Burkinio, Senegalio kaj Togolando.

Organizi tion ne estas facile, kiel povas atesti nia komisiito Yaovi KUADJO, kiu klopodas de preskaý du jaroj por plenumi la procezon. Interalie la prepara kuknveno, kiu devis okazi en decembro 2003, poste en marto 2004 en meza loko, Dapaong, ne povis okazi pro nekompreneblaj malfacilaĵoj starigitaj de la regionaj kaj þtataj administraj aýtoritatoj de la akcepta lando. Ni devis returniøi al la bazo, por taski la pluzorgajn komitatojn prepari la grupojn kaj ties reprezentantojn al tiu granda demokrata ekzerco. Nia øenerala sekretariino, Danièle Charier, preparis kaj distribuis por tiu okazo æiujn necesajn klarigajn dokumentojn.

*Sed kiu povas haltigi la volon de konvinkitaj mutualistoj ?*

*Globidar*



Al sudkivuta Kongiano, kiu elvolvis multe da energio por rilatigi la lokajn grupojn kun Monda Fonduso, iu administranto sendis tiun averton, ke oni ne lulu la homojn en la iluzio de venonta profito. Nia konga globidarano respondis :

*"Vi riproæis al mi, en via letero de la 6a de aýgusto luli homojn per iluzioj æar en tuja tempo tio nenion alportos. Kompreneble, tio nenion alportas, sed ankaý ni volas respondi al la alvoko de la tutmonda solidareco. Tio ne honorigas nin, kiam ni devas resti ekster tiu monda agado.*

*A.K.S. - Mboko*

Kiam oni scias, ke Mboko estas en la kerno de unu el la regionoj plej vunditaj de la militoj de 1996 kaj 1998, kaj ke la humana situacio estas tie katastrofa, æu tio ne meritas enpreson en la bultenon ? Kompreneble jes !

*Globidar*

**POR DISKONIGI MONDAN FONDUSON KAJ TIES BULTENON, VI POVAS MENDI :**

ð aliøilojn (senpage)
ð blankajn æemizojn 20 € kaj blankajn trikotæemizojn 15 € kun emblemo de Monda Fonduso. Æiuj mezuroj. + afranko : 3 €
ð la prezentbroþuron de Monda Fonduso (1 €)
ð kovertojn kun la frazo :

*La tero nutrus æiujn homojn*
*se æiu solidare agadus*

100 por 6,80 € + sendkostoj: 3 €
(Ekzistas ankaý en franca lingvo)

ð memglumarkojn (1 € )
ð fotojn (prunto aù aæeto) : projektoj en Burkinio, Benino, Kamerunio, Togolando, Ruando, Kongio
ð multajn aliajn dokumentojn.
ð Protokolo de la Plena Kunsido de Kongreso de la Popoloj. (Esperanta, franca, aý angla : 3 € )

**KOTIZOJ - DONACOJ - ABONOJ - MENDOJ :**

*Kiel pagi ?*

Äper franca æeko al Globidar
Äper poþtaj rimedoj, je la nomo de : MFSCF - MONDA SOLIDARECO (PÆK-CCP PARIS 10.734.96 Z)

RIP : FR 57 30041 00001 1073496Z020 31

Äper novaj poþtmarkoj kiel eble sufiæe diversaj, ankaý per monbiletoj enþovitaj en ordinaran koverton.

ÄFEL kaj UEA kontoj : mfsk-g

Librotenado je la sama adreso kiel la bulteno

Sur la adresetikedo de la koverto aperas la proksimuma dato de via lasta financa partopreno. (situacio je la 23an de marto 2004). Tiel ni esperas eviti la poþtajn elspezojn por rememorigoj.

**RICEVITAJ KOTIZOJ kaj DONACOJ**

| | |
|---|---|
| Novembro 2003 : | 1 138 € |
| Decembro 2003 : | 2 369 € |
| Januaro 2004 : | 1 721 € |
| Februaro 2004 : | 899 € |

*MONDA SOLIDARECO* estas eldonita en Esperanto, kaj franca lingvoj.

**Jara abono : 5 €**

**Partoprenis en la redakcio de tiu numero : :** Alain Cavelier, Danièle Charier, John De La Cruz, Daniel Durand, Odile Durand, Emmanuelle Gen, Patrice Lovesse, Christian Trianneau.

**Desegnoj** : Yasmina Sahraoui, John De La Cruz

**Fotoj** : MFSKM

Elfrancigis Daniel Durand, Marie-France Condé-Rey

Directeur de la publication : Daniel Durand
CPPAP n-68703. Imprimerie spéciale.

Tel : +33 (0)241 78 47 75
info@globidar.org
**http://www.globidar.org**

*MONDA SOLIDARECO*
Les Nids
**FR 49190 St-AUBIN-DE-LUIGNE**
Francio